konsumadon (kiu ĝenerale estas organizita reproduktado de bezonoj).

Alia ekzemplo estas la televido, tiu konfuziga maŝino surbaze de la krudmaterialo "informo"; ĝi reproduktas realecon respektive tion, kion la manipulistoj intencas scenigi kiel reala. Tn. dokumentoj estas nigra maniero de la vero; la *live*–bildo estas la *nigra* bildo en la tempa dimensio; en la spaca dimensio ĝi estas enscenigita por la antaue kauriĝantojkiel *blanka sperto* ("ĉe ARD k ZDF vi sidas en la unua vico" – de la simulado !)

La kiberspaco estiĝos la unua imagita spaco, kiu estas enirebla; ni ĝuos la kiberspacon per "datumo–ganto", per "datumo–okulvitroj" k per "datumo–skafandro"; pli poste ni progresos kosmen per "teleĉeestado". Tiurilate la natura spaco estas la *nigra spaco*; la virtuala kiberspaco estos la *blanka* spaco sen prabildo, la fantasmo de la reproduktita paradoksa spaco kun dilato sen distanco: la perfekta *blanka* originalo, spaco kun kompleta ekskludo de naturspacaj ekscitoj. Eventualaj bioĉipoj permesos eĉ la lastan paŝon en imagitan mondon.

Sed ankorau ni vivas en surteraj sistemoj, k tiuj estas skuitaj per krizoj. Ni travivas ekz. la krizojn de la etnoj. Interese estas la konstato, ke la raso estas specifa socia ĵo, kiu rezistas al la nihiligaj tendencoj de la kapitalo; raso estas la espero al kolektiva formo de *nigra* originaleco. La diverseco inter raso k nacio korespondas al tiu inter terposeda ĵo k monposeda ĵo.

La reganta *blanka* sistemo estas antau ĉio minacata per krizoj, kiujn ĝi mem produktas pro sia emo al kvanta progresado; ĝi estas ĉefe minacata per la kauzita malriĉeco de la Tria Mondo (pro ne plenumebla feliĉo–promeso) k per globala ekologia krizo; el nur regionaj militoj k apartaj krizoj ĝi nur tiras pluan profiton. –

Postrimarko: legante la ĉapitron, en kiu la autoro pritraktas ideon de W. Benjamin pri la "auro" ("Das Kunstwerk im Zeitalter seiner technischen Reproduzierbarkeit") altrudiĝas certa idea similieco al la nocio de la tn. "interna ideo". La auro estas karakterizita la identeco de reala ĵo au artefara ĵo: tia auro estas substanco de la historieco, sed kiel tia ne (au nur tradicie) transdonebla; ĝi restas *nigra* originalo antau sia identigado; la rezulto post la identigado estas blanka originalo. rh





## INFORMOJ el la SCIENCA LITERATURO

NEW SCIENTIST, n–ro 1813, 21.03.1992, p.11.

Kripligitaj genmanipulitaj gentoj de *escherichia coli* atingis, per sendado de malpurigitaj laborvesta ĵoj en lavejon, vivantaj la poluakvon, kie ili travivis ankorau 72 horojn k sukcesis interŝanĝi kun sovaĝe vivantaj bakterioj.

(Dutch National Institute of Public Health and Environmental Protection). rh

idem, p. 21

Fremdaj genoj, pasigitaj en plantoj (*raphanus sativus*), povis disvastiĝi per insekta polenado. La fremdgenoj en la polenoj de la genmanipulitaj plantoj atingis per insektoj la pistilojn de naturplantoj en la ĉirkaua ĵo de unu kilometro; tiel fremdgenoj disvastiĝis en la medio, ankau se la plantoj restas fiksaj.

(Norman Ellstrand, University of California). rh

SCIENCE, Vol. 257, 31.07.1992, p. 613, 635–641.

A. A. Beaudry k G. F. Joyce, Scipps–Research–Institut, California, sukcesis krei molekulon lau evolua maniero: per selektado k variigo helpe de genteknologiaj metodoj. Inter alie ili produktis milionojn da kopioj k imitatis hipotezon de memorganiziĝaj procesoj (Manfred Eigen). Celo estas RNS–molekulo, kiu memplimultiĝas.

Sed la vojo pli gravis ol la celo: "Estis la unua fojo, ke ekestiĝis nova kemia aktiveco per selektado k mutado" (C. Biebricher). rh